## NACILINGVA INFORMILO DE TEJO: REDAKTANTO SERCHATA

En antaua numero de TEJO-aktuale ni aperigis alvokon por trovi tradukantojn al naciaj lingvoj de novajhoj por ekstera informilo de TEJO. Nun serchatas redaktanto kiu elektu kaj adaptu la tradukotajn informojn. La tasko estas sufiche malgranda kaj plenumenda nur chiun duan monaton au simile. Por plu informighi au kandidatighi skribu al Katja Ignatjeva katido@mac.com.

## ESPERANTA RETPAGHO PRI VIRINA ORGANIZO EL AFGANIO

La Revolucia Asocio de la Virinoj de Afganio (RAWA) kampanjas por virinaj rajtoj en Afganio. Iliaj dokumentoj estas nun tradukataj ankau al E-o; la unua jam aperas che http://rawasongs.fancymarketing.net/ny-attack_es.htm.

Jakobo Schwartz quark@alum.mit.edu, Jachjo Russell jrussell@wnec.edu

## AZIA PROJEKTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO: LINGVO DE PACO

La Azia Komisiono de UEA, kun la helpo de kelkaj neaziaj esperantistoj, decidis lanchi la kampanjon "Zaban-e-Salam/Lingvo de Paco" por la afganaj rifughintoj en najbaraj landoj; ghi konsistos el:

1. E-kursoj por afganaj intelektuloj en la najbar-landaj rifughejoj
2. kursoj pri la nacia lingvo por afganaj analfabetaj rifughintoj
3. materia helpo al la rifughintoj

Jam estas planataj du kursoj en Teherano kaj Mashhado (Irano). Por kontribui sendu vian monan subtenon al la konto Azia Fondajho che UEA, per la kutimaj pagmanieroj (vidu http://www.uea.org). Vi povas ankau indiki kiun el la tri menciitaj celoj vi volas subteni. La kontaktuloj estas:

Reza Torabi reza@esperanto.org (kursoj)
Hans Bakker hbakker@groenlinks.nl (materia helpo)
Atilio Orellana iei001@worldonline.nl (kampanjo kaj ghia popularigo)